**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 27

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Kiu havas malican celon, ofte perdas sian propran ␣ **el** ␣ ␣.

**2.** De malgranda kandelo forbrulis granda ␣ ␣ **st** ␣ **l** ␣.

**3.** Troa festeno estas ␣ ␣ **n** ␣ **n** ␣.

**4.** Sur la fruktodona tero ŝprucis malhela arbareto de akacioj kaj sikomoroj, inter kiuj kaŝiĝis malgrandaj palacoj kun vicoj de ␣ **ol** ␣ **n** ␣ ␣ aŭ flavaj terotegitaj dometoj de l' kamparanoj.

**5.** Ŝi aperis ĝuste je la oka, kiam jam komencis iom ␣ **r** ␣ **p** ␣ **sk**␣ ␣ **ĝ** ␣ kaj malhela ombro rapide enŝteliĝis tra la korta pordo.

**6.** Nun la trajnoj povas uzi la tramtrakojn ĝis la ĉefplaco de Linco, sed pro la ␣ **r** ␣ **t** ␣ **c** ␣ de la linio la maksimuma rapido estas nur 25 kilometroj hore.

**7.** Oni rimarkis sur la ŝoseo du belajn skarabojn, ĉiu el la sanktaj insektoj rulis antaŭ si argilan ␣ ␣ **l** ␣ **t** ␣ ␣.

**8.** Post ricevo de la jam rezervitaj enirpermesoj ĉe la ␣ ␣ **l** ␣ **t** ␣ **j** ␣ ni tri disiros kaj vi ambaŭ eniros malkune en la kinejon, kiel nekonatoj.

**9.** La nacia kuirarto ampleksis nur du sanajn pladojn: lardon kun brasiko, kaj brasikon kun **t** ␣ **r** ␣ ␣ **m** ␣ ␣.

**10.** Estis la unua fojo ke la kondamnitoj ekinteresis min kaj mi ␣ **c** ␣ **v** ␣ **l** ␣ ␣, pri kio ili estas kulpaj.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Kelkajn tagojn poste **e** ␣ **s** ␣ **l** ␣ ␣ ␣ ␣ alia bombo en parko kaj drinkejo: mortis 10 homoj kaj estis vunditaj dekoj pli; sekvis aliaj atencoj ĉe drinkejoj.

**2.** Se tiu prospero daŭros ĝis la printempo, la kabineto havos grandan ŝancon ricevi denove kvarjaran **m** ␣ **n d** ␣ ␣ ␣ ␣ de la voĉdonantoj.

**3.** La Azianoj aldonis, ke en la nordo la akvo fariĝas ŝtono, kaj la vaporo – blanka salo, kiu tamen havas neniun guston, sed **p** ␣ **nĉ** ␣ ␣ la fingrojn kaj agacigas la dentojn.

**4.** Plej kruele laŭ Mannheimer estis la disigo de la familio kaj la selektoj, ne la bategoj, jarojn poste li sentis la vivtaskon raporti kaj **a** ␣ **m** ␣ **n** ␣, ke neniam plu okazu similaĵo.

**5.** Tiu **m** ␣ **d** ␣ **k** ␣ **m** ␣ **n** ␣ ␣ estas uzata ĝuste por malhelpi la mordadon de ungoj.

**6.** Tra la vitra kovrilo de la tempomontrilo oni povis observi la estiĝon kaj forpason de sekundoj, minutoj kaj horoj, vidi la radetojn, hokojn, **ŝ ␣ ␣ ŭb ␣ ␣ ␣**, kiuj funkciigas la misteron de la tempo.

**7.** Kiam **t ␣ ␣ kt␣ r ␣** laboras sur liaj kampoj, la najbaroj sentas specialan odoron kaj demandas, ĉu biodizelino ne damaĝas la motoron.

**8.** Gaja bluo de la ĉielo efikis trankvilige kaj en la aero ŝvebis la **p ␣ rf ␣ ␣ ␣** de la freŝe tranĉita herbo.

**9.** Krom esti verkita de **em ␣ n ␣ ␣ t ␣** edukisto, la allogon de la libro kreskigas ankaŭ abundaj ilustraĵoj fare de la fama franca desegnisto Plantu.

**10.** La suno atingis la **n ␣v␣ l ␣ ␣** de la maro kaj la cignoj ekflugis malsupren tiel rapide, ke Elizo pensis, ke ŝi falas.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| konvink', stamp', vidv', rem', kripl', pretend', tremp', sekretari', ilustr', akurat'. |
|---|

**1.** La verkoj de Trevor Steele **␣ r ␣ ␣ ␣ ␣ ĝ ␣ ␣** en la esperanta kulturo, do li estas ekstreme reprezenta pri nia grupo, aŭ komunumo.

**2.** Kamparanoj apud Kasa ne volis rebonigi kanalon **␣ ␣ ␣ t ␣ ␣ ␣ ␣ n ␣ ␣**, ke por ilia laboro devas pagi al ili la ŝtata trezorejo.

**3.** Vi havas la tutan mian dankemon kaj vi **␣ ␣ ␣v␣ ␣ ␣ ␣ ĝ ␣ ␣**, ke ĝi ion valoras.

**4.** Inge Stejneke desegnis por la libro multajn ĉarmajn **␣ ␣ ␣ s ␣ ␣ ␣ ĵ ␣ ␣ ␣**, kiuj helpas kapti buntecon kaj variajn melodiojn de la plenĝoja vivo.

**5.** La nuna kajero de nia revuo denove estas malpli dika, ni esperas per tio reakiri ĝisdatecon kaj **␣ ␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ c ␣ ␣**.

**6.** Kiel diligenta sklavo, la juda skribisto Pemper ĉiumatene preparis novajn paperfolion kaj karbonpaperon, ne nur por si mem, sed ankaŭ por la germana **␣ ␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ i ␣ ␣** de Göth.

**7.** Al personoj, kiuj spertis mem **␣ ␣ d ␣ ␣ c ␣ ␣** ŝiaj versoj ankoraŭ malsekigas la okulojn: *Finiĝis la libro kiun ni verkis kune, el via senforta mano falis la plumo…*

**8.** Nun grupo da virinoj, trafitaj de mamkancero, kune sportas **␣ ␣ m ␣ ␣ t ␣** kaj ĉiuj opinias, ke pliboniĝas ne nur ilia fizika, sed ankaŭ ilia spirita stato.

**9.** Kiam venis Ramzes XIII, la tuta urbo forlasis la domojn por saluti lin, hejme restis nur maljunuloj kaj **␣ ␣ ␣ p ␣ ␣ l ␣ ␣**, kaj en mallumaj stratoj ŝtelistoj.

**10.** En eta poŝtoficejo de la urbeto poŝtistino ĉiun matenon enpikas **␣ ␣ ␣ m ␣ ␣ l ␣ ␣** por ŝanĝi ties daton.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** En Koreio, gepatroj decidas elspezi multe da mono por ___ siajn infanetojn je la lango kun espero, ke ili pli bone prononcos la anglan.

**a.** distri **b.** ŝirmi **c.** operaciigi **d.** krevi

**2.** Ramzes ne ___, ke la pastroj, eĉ farante tiel malhonoran traktaton kun Asirio, havis perfidajn intencojn.

**a.** ŝparis **b.** kroĉis **c.** detruis **d.** suspektis

**3.** Niaj legantoj estis ___ kaj sendis senerarajn respondojn.

**a.** sagacaj **b.** glataj **c.** evidentaj **d.** severaj

**4.** Promenante sur la stratoj de Erevano oni povas vidi malnovajn konstruaĵojn apud la ___, kaj belegajn kafejojn kaj restoraciojn, akvan parkon, ktp.

**a.** frenezaj **b.** vanaj **c.** modernaj **d.** eternaj

**5.** Mugabe, prezidinto de Zimbabvo, brutale forpelas blankajn bienulojn por (laŭ la propagando) redoni ties ___ al propraj popolanoj.

**a.** leporojn **b.** jupojn **c.** makulojn **d.** terenojn

**6.** Golfludo estas familia ___ – patro povas ludi kun filino, profesia ludanto kun amatoro, ĝi estas ankaŭ utila el sana vidpunkto.

**a.** sporto **b.** karaktero **c.** bileto **d.** lano

**7.** Planataj estas pli rapidaj ___, kiuj veturos senhalte kaj bezonos nur 16 minutojn, sed la veturkosto estos ok eŭroj.

**a.** sukoj **b.** trajnoj **c.** larmoj **d.** tritikoj

**8.** La korteganoj, kiuj nun ankaŭ aperis, estis ___ kaj grandsinjoraj, sed kiu povosciis bone rigardi, tiu povis tuj rimarki, kia estis ilia esenco.

**a.** tapiŝaj **b.** severaj **c.** nudaj **d.** elegantaj

**9.** La prezidanto ne nur estras la registaron sed ankaŭ influas parlamenton kaj administras direktorojn de uzinoj kaj mezlernejoj – tiu ___ estas apenaŭ efika.

**a.** ĉifono **b.** sistemo **c.** terpomo **d.** vazo

**10.** Blagovest pensis pri la junulino, ŝi estis eta, senhelpa, simila al neĝfloro, kiu timeme montris sin tra la neĝa ___ .

**a.** valizo **b.** tondro **c.** cigaredo **d.** vualo